Raporto pri prelegvojaĝo de Thorbergur Thordarson en Svedl

Prelegtago	Prelegloko	Preleg nombro	Nombro de aŭskultantoj	Tranoktejo	Tranokttemp
Septembro 22.	Ystad	1	ĉirkaŭ 200	Hotelo	Unu nokto
—"— 23.	Billesholms Gruva	1	100	Hotelo	Tri noktoj
—"— 26.	Torekov	1	80	Hotelo	Unu nokto
—"— 27.	Strömsnäsbruk	1	25	Hotelo	Du noktoj
—"— 29.	Hällevik	1	26	Privata domo	Du noktoj
—"— 30.	Nogersund	1	80	Reiris al Hällevik	
Oktobro 1.	Karlskrona	1	ĉirkaŭ 400	Hotelo	Unu nokto
—"— 2.	Thorskors	1	15	Privata domo	Du noktoj
—"— 6.	Nyhamn	1	55	Privata domo	Unu nokto
—"— 7.	—"—	1	145		
—"— 8.	Enskede	1	30	Hotelo	Du noktoj
—"— 9.	Uppsala	1	70	Hotelo	Tri noktoj
—"— 10	—"—	1	35		
—"— 12.	Tierp	1	11	Privata domo	Tri noktoj
—"— 15.	Bergvik	1	150	Privata domo	Unu nokto
—"— 16.	Hudiksvall	1	40	Privata domo	Du noktoj
—"— 18.	Sundsvall	1	57	Privata domo	Unu nokto
—"— 19.	Härnösand	1	100	Privata domo	Unu nokto
—"— 20.	Gevle	1	21	Privata domo	Unu nokto
—"— 21.	Österfärnebo	1	80	Hotelo	Unu nokto
—"— 22.	Västerås	1	57	Privata domo	Unu nokto
—"— 23.	Eskilstuna	1	67	Hotelo	Unu nokto
—"— 24.	Norrköping	1	90	Hotelo	Unu nokto
—"— 25.	Katrineholm	1	125	Hotelo	Unu nokto
—"— 26.	Norrahamar	1	100	Privata domo	Unu nokto
—"— 27.	Jönkoping	2	500	Privata domo	Unu nokto
—"— 28.	Ulricehamn	1	250	Hotelo	Unu nokto
—"— 29.	Halmstad	1	ĉirkaŭ 150	Privata domo	Unu nokto
—"— 30.	Falkenberg	1	ĉirkaŭ 45	Hotelo	Du noktoj
Novembro 1.	Varberg	1	ĉirkaŭ 30	Hotelo	Du noktoj
—"— 3.	Göteborg	1	55	Privata domo	Du noktoj
—"— 5.	Uddevalla	1	ĉirkaŭ 100	Hotelo	Unu nokto
—"— 6.	Lidköping	1	35	Hotelo	Du noktoj
—"— 7.	—"—	1	ĉirkaŭ 80		
—"— 8.	Skövde	1	77	Hotelo	Kvar noktoj
—"— 9.	Skara	1	32	Hotelo	Unu nokt
—"— 10.	Tibro	1	45		
—"— 11.	Tidan	1	22		
—"— 12.	Karlsborg	1	51	Hotelo	Unu nokto
—"— 14.	Nossebro	2	100 + 42	Privata domo	unu nokto
—"— 15.	Hällekis	2	100+150	Hotelo	Unu nokto

ando dum la tempo de la 22. de Septembro gis la 15. de Novembro 1936.

o	Manĝejo	Honorario	Rimarkoj.
	Hotelo	Kr. 30,00	
	Hotelo	— 30,00	
	Hotelo k. privat domo	— 30,00	
	Hotelo	— 30,00	Tre bela vetero kaj piedpilko fortiris aŭskultontojn.
	Privata domo	— 15,00	Bela vetero, multaj sur maro, multaj ĉe rikoltado.
		— 15,00	
	Hotelo	— 10,00	Gimnazia prelego. — B. Beckman pagis mian restadon.
	Priv. domo	— 15,00	„Prelegoj ĉiam malbone vizitataj ĉi tie."
	Priv. domo	— 15,00	„Tre bona vizitado laŭ ĉi tiea kutimo."
		— 10,00	Infanlerneja prelego.
	Hotelo	— 30,00	
	Hotelo	— 15,00	„Tre bona vizitado." — Du taga loĝo kaj ĉambro
		— 7,50	pagataj de la aranĝantoj. — La lasta prelego por bontemplana kunveno. „Plej bona programo de la jaro."
	Hotelo	— 15,00	La tago ne oportuna. Prelegoj ĉiam malbone vizitataj.
	Priv. domo	— 15,00	„Tre bona vizitado."
	Priv. domo	— 15,00	
	Priv. domo	— 15,00	Nur por esperantistoj.
	Ĉe samideano	— 15,00	„Neordinare bona vizitado."
	Privata domo	— 10,00	Nur por esperantistoj. La tago ne oportuna.
	Hotelo	— 15,00	
	Privata domo	— 15,00	La vizitadon tre malmultigis deklamado de sveda
	Hotelo	— 30,00	verkisto, kiu okazis samtempe en la sama domo.
	Hotelo	— 30,00	
	Hotelo	— 30,00	
	Privata domo	— 15,00	„Tre bona vizitado."
	Privata domo	— 30,00	Infanlernejaj prelegoj.
	Hotelo	— 35,00	
	Privata domo	— 20,00	
	Hotelo	— 15,00	
	Hotelo	— 15,00	Loĝo kaj manĝo pagataj de la aranĝantoj.
	Hotelo	— 30,00	Nur por esperantistoj.
	Hotelo	— 20,00	
	Hotelo kaj private	— 30,00	Samtempa Sovetfesteno kaj kunveno de socialista junularo malmultigis la vizitadon.
		Senpaga	
	Hotelo	Kr. 30,00	Bona vizitado. Tamen ĝi estus pli bona se ne samtempe okazus senpaga filmprezentado.
	Hotelo	— 30,00	
		— 30,00	
		— 15,00	E. Malmgrenen promesis al la aranĝanto L. Åberg, ke Svenska Esperanto-Förbundet pagos la sumon, kiu
	Hotelo	— 30,00	mankos al 30 Kr., do 15 Kr.
	Privata domo	— 30,00	La unua prelego estis infanlerneja.
	Hotelo k. private	— 30,00	La unua prelego estis infanlerneja.

Rimarkoj.

1) Miaj prelegoj konsistis el kvar partoj: a) prelego, kiu daŭris dum 50 ĝis 55 minutoj, laŭ lerteco de la interpretanto; b) deklamo de tri versoj el fama islanda poemo de la deka jarcento, kaj deklamo de tri versoj el konata poemo de la nuna jarcento. La ambaŭ deklamoj daŭris ĉirkaŭ 3 ĝis 4 minutojn. En la unuaj lokoj mi faris la deklamojn laŭ deziroj de la aŭskultantaro. Poste ili fariĝis fiksa programteksto; c) montro de 55 lumbildoj, kiuj ilustris islandan kulturon kaj naturon; daŭris ĉirkaŭ 20 ĝis 25 minutojn; ĉ) tri popolkantoj sur gramofondiskoj; daŭris ĉirkaŭ 5 minutojn. En kelkaj lokoj mi ne povis aŭdigi la melodiojn pro tio, ke la aranĝantoj ne povis havigi gramofonon. La tuta prezentaĵo do daŭris ĉirkaŭ 80 ĝis 90 minutojn, en kelkaj lokoj pli longe, se la interpretado ne iris sufiĉe glate.

2) Pri la interpretado mi deziras rimarkigi la sekvanton: En kelkaj lokoj la interpretado estis tre malbona, en plej multaj lokoj ne bona, sed kontentiga, en kelkaj bona, sed en tre malmultaj tre bona. La malbona aŭ ne bona interpretado laŭ miaj impresoj ne venis nur de malbona scio de Esperanto, sed ĝi ankaŭ kaŭziĝis pro ne sufiĉa posedo de la sveda lingvo. Dum la unua duono de mia prelegvojaĝo mi reskribis, iom ŝanĝis, mallongigis kaj plisimpligis mian originalan manuskripton, kaj substrekis ĉiun vorton kaj frazon, kiuj laŭ ricevita sperto montriĝis plej malfacile tradukeblaj. Tiun manuskripton mi ĉiam donis al la interpretanto tuj kiam mi venis al la prelegloko, por ke li trarigardu la atentindajn punktojn. Tio plibonigis la interpretadon. Malbona interpretado ne nur malsukcesigas la prelegojn, sed ĝi ankaŭ timigas la publikon de plua vizitado de esperanto-prelegoj. Ĉar prelegoj de eksterlandaj personoj estas preskaŭ la sola praktika utilo, kiun Esperanto en sia nuna stadio povas doni al plejmulto de ĝiaj lernantoj, malbona interpretado povas esti danĝera por la esperanto-movado. Tial estus dezirinde, ke oni klopodu eduki unu bonan interpretanton en ĉiu esperanto-centro.

3) La gazetaj raportoj, kiujn mi vidis, pri miaj prelegoj, en plej multaj okazoj ne estis sufiĉe lerte aranĝitaj. Ili estis tro neŭtralaj, tro indiferentaj. Iliaj mankoj precipe estis tiaj, ke ili ne sufiĉe ilustre akcentis la specialaĵojn de miaj prelegoj. Tiuj specialaĵoj estis miaj klaraj priskriboj je la vulkanaj erupcioj, je la vulkanfaraj katastrofoj, je la varmaj akvofontoj kaj iliaj praktikaj signifoj, miaj bildoj, kiuj montris naturon tiel malsimilan al naturo de aliaj eŭropaj landoj, ke ĝi estas kvazaŭ alia planeo, alia mondo.

kaj fine miaj melodioj. Ĉi tiujn specialaĵojn la raportantoj devis vigle, iom pentre, eĉ iomete troige priskribi por altiri la publikon kaj por pli facile kovri kostojn de la aranĝantoj.

4) Antaŭ ol mi ekiris al Svedlando por mia prelegado, sinjoro E. Malmgren promesis [letere] al mi, ke mi ĝenerale ricevos 30 kronan honorarion por ĉio prelego. Krome li promesis ĉirkaŭ 60 prelegojn kaj kalkulis tiel, ke mia neta gajno per ĉiu prelego estos proksimume 15 kronoj. Fidinte al tiuj ĉi promesoj, mi rezignis pri profitdona laboro en mia lando, faris longan kaj multekostan vojaĝon kaj aranĝigis bildojn por ĉirkaŭ 80 kronoj, por prelegi en Svedlando. Sed kiam mi venis al Svedlando la plenumoj fare de sinjoro Malmgren estis tiaj, ke kun multaj kluboj kaj societoj li traktis kaŝe malantaŭ mi, ke ili pagu nur 15 ĝis 20 kronojn por la prelego, kaj kiam mi komencis severe postuli, ke li plenumu siajn promesojn, li tute kapitulacis, ĉesis organizi la promesitajn prelegojn kaj tiamaniere kaŭzis al mi pliajn ekonomiajn perdojn. Krom tio li organizis mian prelegvojaĝon malbone. Cetere mi deziras esprimi mian admiron pri agado de sinjoro L. Åberg en Skövde, kiu organizis miajn prelegojn en Skarabergs Läns Esperantodistrikt tre lerte kaj konscience. Li ŝajnas esti idealo kiel bona organizanto.

5) En plej multaj lokoj mi estis tre amike akceptata, kaj foririnte el Svedlando mi sentas min amike ligita al plej multaj svedoj, kiujn mi renkontis dum mia vojaĝo. Ankaŭ mi ne faris iajn aliajn postulojn en Svedlando ol ke Malmgren plenumu siajn promesojn, kion li tamen ne faris. Mi neniam petis pri loĝo en privataj hejmoj, sed mi akceptis ĝin, kiam oni proponis tion, ĉar alie la ekonomiaj perdoj pro mia vojaĝo, estus tro grandaj por miaj fortoj. Cetere mi ĉiam preferus loĝi en hoteloj.

Kopenhago, la 29an de Novembro 1936.
Thorbergur Thordarson.